




Instruisto: „Mi banas min; vi banas vin; ŝi banas sin. Kiu tempo tio estas?“
Lernanto: „vendredo vespere!“

**Serĉbildo**

Inter la bildoj ekzistas dek diferencoj. Serĉu ilin!

***Solvo el la septembra numero de S.F.:***

***horizontale:***
1. taso 5. Isis 8. ibiso 9. koro 10. onkl' 11. alarm' 14. arbar' 17. eriko 20. sekundo 21. abion 23. ikono 26. omaro 29. melo 30. kemi' 31. bruna 32. osmi' 33. mono
***vertikale:***
1. tikla 2. streb' 3. abel' 4. astr' 6. sendi 7. salto n 11. areno 12. amuza 13. medio 15. rob' 16 aso 18. rok' 19. kan' 21. armeo 22. islamo 24. opero 25. olivo 27. maro 28. rano

**konontaktu nin!**

**Gun.Eb@t-online.de** **+49 3831 490003**

# Stralsundaj frekvencoj

**Per Esperanto por popolkomprenigo**

**jaro 2004** **novembro**

⌘

**La ŝtorm', ĝi hurlas ĉe la hejm',**
**mi – ne stultul',do sen problem' -**
**volas nun ekstere resti,**
**ĝia kunludanto esti.**

laŭ Joseph Freiherr von Eichendorff

Ankaŭ la aŭtuno povas havi agrablajn tagojn. Mi proponas al vi okupiĝi pri Esperanto. Informu vin pri la aranĝoj ankaŭ en nia regiono aŭ legu interesan libron haveblan en nia E-grupo aŭ en la Stralsunda urbo-biblioteko.

Gunter

# *Kio okazis?*

Dum la lastaj du monatoj ankaŭ en nia regiono kelkaj aranĝoj pruvis, ke Esperanto vivas.

Dum la rikoltofesto en la vilaĝo Prohn je la 11a de septembro ni organizis informbudon pri nia lingvo. Bedaŭrinde la vetero estis terura kaj nur malmulte da homoj kuraĝis stari antaŭ nia giĉeto por ricevi informojn. Tamen jam de malproksime onis povis legi nian sloganon: *„Plattdütsch för den Nurden, Hochdütsch för alle Dütschen und Esperanto för alle Minschen!“*. Mi pensas, ke oni povas denove fari similan venontjare kaj ankaŭ aliloke.

❍

Je la 15a ĝis 16a de oktobro oni honoris en Dresdeno la unuan E-poetinon en Germanio, Marie Hankel. Vendredo vespere estis enaŭgurata ekspozicio pri ŝia vivo en la urbodomo de Dresden-Löben kaj ĉeestis eĉ du el ŝiaj pranepoj.

Kompreneble oni deziris, ke partoprenu ankaŭ reprezentantoj el la federacia lando de ŝia naskiĝo. Do venis Ralf Kuse kaj mi laŭ peto de d-ro Schwarz. La sabato apartenis al prelegoj pri Marie Hankel. Komence Ralf helpe de siaj teknikaj eblecoj raportis pri la junaj jaroj en Schwerin ĝis la translokiĝo al Dresdeno. Poste ni aŭskultis prelegon pri la esperantistino Hankel, pri ŝia konatiĝo kun la lingvo, pri unuaj honorigoj kaj pri ŝia laboro en la monda movado.

Posttagmeze ni vizitis komune kun ŝiaj parencoj la tombon, kio bone estas flegata kaj ties memorŝtono donas al ĉiuj informon pri Esperanto.

La aranĝo finiĝis per bela koncerto de Ralph Glomp kiel reprezentanto de la Dresdena ĝemelurbo Hamburgo.

❍

Vizito el Afriko en Stralsund



De la 19a ĝis 21a de oktobro mi ricevis longe anoncitan sed tamen surprizan viziton el Benino. La estro de la de ni subtenata lerneja projekto, Francois Houncounou el Lokossa venis dum sia Eŭropo-vizito ankaŭ al Stralsund kaj pluveturis poste al Francio.

Dum la tri tagoj ni uzis la eblecon konatigi nian gaston kun nia urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo. Me kredas, ke li havis bonajn impresojn.

❍

Semajnfina seminario en Neubrandenburg

Jam tradicie ni en Neubrandenburg renkontis de la 29a ĝis 31a de oktobro al E-seminario, ĉifoje en centro por aŭdsenso-handikapuloj. La aranĝo okazis en du grupoj, do por komencantoj kaj por progresantoj gvidataj de Werner Pfennig kaj René Philipp.

Por la bongusta nutrado de la ĉeestantoj zorgis la partoprenantoj mem, sed la ĉefan laboron havis Brunhilde Pfennig. Al ŝi apartenas speciala danko. Estus dezirata, se kiel jam antaŭ dudek jaroj pli multaj interesiĝus por tiu ĉi evento. Ni certe ĉiuj bezonas de tempo al tempo iom da pluklerigado.

***Venonta aranĝo:***

Landa Zamenhof-festo
Wir treffen uns in Rostock, am Sonnabend dem 04. Dezember 2004
10 – 17h im Kunst-Café der Kunsthalle am Schwanenteich.